

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 49, Marto 2022



*Ĉu la printempo atendas ekster Vinga survoje al Gotenburgo ?*

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo.....	2	Somardagar i Göteborg 2022 – prova en kurs i Esperanto .....	15
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	”Stulta kiel Azeno” .....	16
Espeporko meditas.....	3	Kial ne investi en la homscienco?.....	16
Reagoj de esperantistoj al la rusa atako kontraŭ Ukrainio .....	4	Pri ”la monda lingvo” diskuto inter Johan Lönnroth kaj Bo Sandelin.....	17
De [HeKo 782 8-C, 28 feb 22], sendita de Bertil Nilsson .....	4	Kapti fremdajn lingvojn.....	18
La ukrainaj kaj svedaj flagoj flirtas en la suno.....	5	Lingvaj parencoj sur parenbranĉoj.....	19
Ni iras al Vinga.....	6	Bonaj Legomoj kaj klimat-ruzlertaj receptoj!.....	20
La lumo en la mallumo.....	7	Filmprojekto en DR Kongo kun Esperanto parolata.....	22
Pri Marstrand .....	7	Kiel nomi ĉi tiun objekton?.....	24
Estas piedsignoj en la sablo.....	8	Komputila humuro.....	25
Unesco nomumis Gotenburgon ”Literatura urbo”.....	9	Studsezono PRINTEMPO en Greziljono, Francio .....	25
Hilma af Klint, enigma pentristo .....	9	Adri Pásztor, Hungario, rekomendas libron.....	26
Hilma kaj la templokonstruistoj.....	10	Invito al librorondo per Zoom.....	27
La koloroj de la ĉielarko estas... ..	11	Esperanto-Societo de Gotenburgo troviĝas nun en Fejsbuko.....	27
Lumbago-specialisto sanigas nur per siaj manoj .....	14		
Granda kamiono – regata de nur unu persono .....	14		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj. La verkisto laŭeble mem reviziu sian artikolon je lingvo kaj gramatiko. Bv respekti eventualan kopirajton se vi kunsendas bildojn.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com).



Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).



## Espeporko meditas...



- ☆ Ukrainio aŭ Ukrainio – sama malbona situacio por la ukrainanoj aŭ ukrainoj. Niaj pensoj kaj preĝoj estu kun ili.
- ☆ Unesco nomumis Gotenburgon: "La Literatura urbo de Svedio". Tio ŝuldigas nin vidigi ankaŭ esperantan literaturon. Ĉu ni translokigu la verkiston Sten Johansson de Norrköping al Gotenburgo? Post 14 monatoj kun lia libro "Sesdek ok" ni renkontos lin en la zoma Librorondo en marto por fari demandojn al li.
- ☆ La arkipelago ekster Gotenburgo bezonas multajn lumturojn. La lumturo Vinga estas la plej konata.
- ☆ Ĉu ankaŭ vi pensas, ke vi pli bone kaptas la anglan, parolate de svedo ol de anglo? Strange!
- ☆ Se en la mondo estus nur blankaj kaj nigraj koloroj (se oni povas enkalkuli ilin inter la koloroj), estus tede. Feliĉe ni estas ĉirkaŭata de koloroj. Hilma af Klint estas artisto, kiu laŭ sia intenco nur post sia morto estas konata. Ĉu ŝia revo dekori elpensitan templon per siaj multkoloraj pentraĵoj en la insulo Venio iam realiĝos?
- ☆ Germanoj kaj aŭstroj ofte estas pli sentemaj al nekutimaj kuracmetodoj ol ni en Svedio. Legu pri la lumbago-specialisto, pri kiu Renate Klag skribas.
- ☆ El Kenjo venas mallonga artikolo pri azeno, al kutimigita al densa trafiko en Najrobo. Sen kondukanto ĝi trovas sian vojon. Do, azenoj ne estas stultaj!
- ☆ En la serio de kuiristoj, Ingegerd donas al ni priskribojn pri vegetaraj manĝoj. Provu fari tiujn kaj inviti viandomanĝantojn ... por konvinki ilin, ke oni fakte ne bezonas viandon.
- ☆ Ni delonge aŭdis pri militoj en Kongo Kinŝasa. Nun esperantistoj kun apogo de UEA produktis la filmon, "Kvazaŭ korpo sen koro". Vi povas spekti ĝin per Ora Ĵurnalo.
- ☆ Esperanto-somera kurso okazos en Gotenburgo 20–23 junio (kvar tagoj). Estu bonvena!
- ☆ En ĉi tiu numero ne troviĝas multe da tekstoj en la sveda. Tial la ĵurnalo havas malpliajn paĝojn ol kutime. Ĉu bone?

/Siv



Libereŭforio en printempa mateno: nenion mi devas fari, neniu devigas min resti hejme aŭ eliri eksteren. Mi mem elektas, dum birdoj kantas pri nestotempa ĝojo kaj venteto balancas betulbranĉojn kun helverdaj etburĝonoj.

*El De Tago al Tago – Libereco de Aira Kankkunen*

## Reagoj de esperantistoj al la rusa atako kontraŭ Ukrainio

**Torben Svendsen, Danio, trovis la jenan en Libera Folio:**

En ĉi tiu teruriga tempo ni, nunaj kaj eksaj aktivuloj de E-movado en Rusio kaj estraranoj de la Rusia Esperantista Unio, sendas nian plej sinceran kunsenton kaj plej bonajn dezirojn al la ukrainiaj samideanoj. La eventoj kiuj okazas en Ukrainio estas vere teruraj kaj ni deklaras ke ni estas kontraŭ tiu milito.



Ni esperas, ke la milito plej baldaŭ finiĝos.

Ni esperas, ke la esperantistoj samkiel la popoloj de niaj landoj retrovos vojojn al paco kaj amikeco plej rapide.

Milito ne estas solvo. Milito estas kontraŭhoma. Milito estas kontraŭ la ideo de Esperanto kaj esperantismo.

*Libera Folio – [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)*

## De [HeKo 782 8-C, 28 feb 22], sendita de Bertil Nilsson

Porinforme sendas al vi la jenon:

### **Rezolucio pri Ukrainio proponita de la Konsulo de la Esperanta Civito**

(La nuna konsulo estas Riichi Karibe.)

La Senato de la Esperanta Civito, kunvokita al telematika konsulto fare de la Kapitulo la 16an de marto 2022, sub la prezido de la Konsulo, sen. Riichi Karibe,

EMFAZINTE ke laŭ la artikolo 5, paragrafo 1 de la Konstitucio "la leĝoj kaj normoj de la Civito estas prioritare kongruaj al la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, proklamita la 10an de decembro 1948";

DEDUKTINTE ke la Esperanta Civito rifuzas agnoskon kiel subjekto de internacia juro fare de aliaj subjektoj, se ili mem ne respektus la cititan Deklaracion;

DEKLARANTE ke pro la agreso, invado, okupacio fare de la rusa armeo en Ukrainio, ekinta en februaro 2022, la Rusa Respubliko profunde malrespektas la principojn de la citita Deklaracio;

BEDAŬRANTE la misefikecon de Unuiĝintaj Nacioj rilate al la prevento de tiuj gravaj, sangaj eventoj, al la haltigo de la milita stato, al la defendo de la malmaltraktita civitanaro, al la adopto de efektiva plano por la rifuĝantaj viktimoj;

**DECIDAS a) daŭre partopreni en la streboj reformi Unuiĝintajn Naciojn, por ke la institucio ne estu plu nur sindikato de naciŝtatoj, kun privilegia statuso por kelkaj potencoj kaj kun tute malsufiĉa agnosko pri la rajtoj de la popoloj sen naciŝtato, unuavice la diasporaj kaj la minorigitaj; b) firme kondamni la konduton de la rusa registaro kaj sincere esprimi solidarecon al**



**la ukrainaj viktimoj kaj al la rusiaj disidentoj pro tiu konduto; c) intense subtenadi ĉe la esperanta popolo la idealojn de reala demokratio, paca kunekzistado, interpopola dialogo.**

[HeKo 782 8-C, 28 feb 22]

***Mi (Siv) petis al Bertil klarigi la nomon HeKo. Jen lia respondo:***

**Heroldo estas "Monata informa gazeto de Kultura Centro Esperantista".**

Ĝi estas fondita por, se mi ĝuste memoras, antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj kaj havas kelkajn malsamajn posedantojn kaj ĉiam ŝajnas havi ekzamenan sintenon al UEA.

Vi ne abonas ĝin sed petas specimenon kaj se vi volas ĝin unufoje monate, vi ricevas ĝin per donaco. Mi ne scias precize kiel ĝi funkcias ĉar mi havas krediton kun Pro Esperanto el kiu mi estas ŝargita.

**HeKo estas "novaĵagentejo"** kaj sur ĉi tiu adreso:

<https://www.esperantio.net/index.php?id=39>

Vi povas legi ĉiujn novaĵojn el la mezo de 2006.

Kiam mi nun esploras, mi malkovras, ke estis mi, kiu verkis la duan novaĵkomunikadon la sesan de junio 2006.

/Bertil

## La ukrainaj kaj svedaj flagoj flirtas en la suno

Svedio kaj Ukrainio – amikoj kun flagoj en la samaj koloroj.

La sveda flago estis oficiale deklarita nur en 1906, kiam la parlamento aprobis la unuan svedan flagleĝon.

La ukraina flago devenas de la fino de la unua mondmilito. Dum la soveta epoko la flago estis malpermesita, (1945–1991).



La kvaran de septembro 1991 oni hisis la flagon denove. La koloroj simbolas grandajn grenkampojn sub blua ĉielo.

Ingegerd fotis.

# Ni iras al Vinga

La lumturo Vinga estis konstruita en 1840–41, sed tiu ĉi unua lumturo sur la loko brilis tiel malklare, ke multaj ŝipoj estis erarigitaj kaj fatalaj eraroj estis faritaj. Tial oni konstruis alian lumturon, kiu troviĝis norde de la unua, sed ankaŭ tio ne sufiĉis. Nur en 1890 estis konstruita la bela lumturo kiu ekzistas hodiaŭ. Vinga iĝis la unua lensa lumturo en Svedio kaj brilis kun kvindek fojoj pli hela lumo ol la du antaŭa kune.

Nia sveda nacia poeto Evert Taube kreskis ĉi tie ĉe la maro. Aŭskultu kion li diras:



”Mi iris al la lumturo. La vojo estis blanka pro prujno. Sed tamen mi ne estus perdinta la vojon – sen la prujno. Kiel negrava ĉio estas kompare kun ĉi tio. Promeni la malnovan vojon super la montoj al la lumturo, sub la radioj, kiuj **fluas ĉirkaŭe** el la lensaparato hodiaŭ, je la sama rapideco kiel kiam mi naskiĝis unu nokton antaŭ 28 jaroj. Estas stellume kaj la maro brilas kien ajn mi rigardas. En la sudokcidento trembrilas ruĝaj kaj verdaj lanternoj. Tie estas haringaj fiŝkaptistoj. La haringoj iras suden ĉi-jare. Neniuj lanternoj videblas norde, sed Pater Noster

briletas je regulaj intervaloj kaj Inholmarna brilas blanke. Mi scivolas kiom longe mi estis for de ĉio ĉi sed mi nur memoras, ke mi estis ĉe balo ĉe sinjorino Tramcourt. ”Signe kaj mi alvenis malfrue,” mi diras. Mi ridas pri mia infaneco kaj aŭdas kiel delikate mia ridado sonas ĉi tie. Poste, estas kvazaŭ mi ĵus diris ion antaŭ 20 jaroj.”

Ligo al ”Arkipelago Edzino” (... konservu babordon, konservu tribordon ...)  
<https://www.youtube.com/watch?v=CtlfxQCIPhY>

Verŝajne estis ekstere sur Vinga, ke Evert Taube akiris ĉiujn siajn sciojn pri la maro kaj la vetero, kiuj tiel profunde karakterizas liajn maristajn kantojn. Ekzemple, ”Valso ĉe Mysingen” eĉ se la medio estas sur la alia flanko de Svedio:

<https://www.youtube.com/watch?v=HT8W7wd7idY>



Mi pensas, ke Evert Taube en sia infanaĝo estis tre sentema por rakontoj, kiujn li aŭskultis vespere, kiam ĉiuj kunvenis post la taga peno ekstere sur la insulo plej malproksime en la maro. Ŝipoj kiuj pereis kaj

averiis, takeloj kaj rigilaro, ŝtormoj en kiuj oni ne staras rekte.

Jes, kiom multe aŭdis kaj spertis la lumturgardistaj infanoj de tiu tempo!  
Ekzemple, la balado pri Bluebird of Hull:

<https://www.youtube.com/watch?v=uCVVj9eTSBw>

Nun ni hejmeniros de Vinga.

/Ingegerd

## La lumo en la mallumo

el la evangelio laŭ Sankta Johano 1:5



Kaj lumo brilas  
en la mallumo,  
kaj la mallumo  
ĝin ne venkis.

*trad. de Ludoviko Zamenhof*

## Pri Marstrand

*En la lunda Zoom-kurso ni uzas la lernolibron EPOGo = Esperanto por gimnazianoj. Pluraj ĉapitroj temas pri la urbeto Marstrand, norde de Gotenburgo. Erika Kristensson, unu el la partoprenantoj, skribis pri sia amata Marstrand. /Siv*

*”Mi kaj mia familio loĝis en Marstrand dum dek kvin jaroj. Marstrand estis fondita de la reĝo Hokon de Norvegio en la mezepoko.*



Tiu parto de Svedio apartenis al Norvegio. Marstrand estis doganlibera urbo, escepte por murdintoj. Judoj konstruis la unuan sinagogon de Svedio sur Marstrand. La urbo havis privilegion kiel ”Porto Franka”.

Marstrand estas laŭ mi la plej bona urbo!

Mi estis en Marstrand plej ofte en aŭtuno, vintro kaj printempo, ĉar tiam ne estas turistoj”. /Erika



# Estas piedsignoj en la sablo


Bildo kaj vortoj de Renate Säfström



Estas piedsignoj en la sablo  
tiel mallaŭte ruliĝas la ondo

La lumo fluas kaj brilas  
kaj varmigas vian kaj mian vangon

Baldaŭ printempo estas ĉi tie  
Espero lumiĝas kaj vivo naskiĝas denove



*La matena lumo pentras la plaĝajn herbejojn en mildaj oraj tonoj.*





# Unesco nomumis Gotenburgon "Literatura urbo" la 8an de novembro 2021

Tion oni celebris la 1an de marto 2022 en la Monda Kultura Muzeo (Världskulturmuseet).



*Johannes Anyuru kaj Olivia Bergdal.*


Estis intervjuoj kun personoj, kiuj influis la literaturan urbon iaspece.


Invititaj estis verkistoj, eldonistoj kaj societoj – i.a. Esperanto-Societo de Gotenburgo. La partoprenantoj espereble ekhavis kontaktojn kaj estonte povos kunlabori.

En la programo du gotenburgaj verkistoj, Johannes Anyuru kaj Olivia Bergdahl, laŭtlegis el siaj venontaj verkoj.

La ĉefaj agantoj por fari Gotenburgon "Nacia Literatura Urbo" estis la urbo mem, la Universitato de Gotenburgo kaj La Literatura Domo de Gotenburgo. /Siv

## Hilma af Klint, enigma pentristo





HILMA AF KLINT  
ALTARPIECE, NO. 1

**Hilma af Klint**, naskiĝis la 26-an de oktobro 1862 en la kastelo de Karlberg en paroĥo Solna, mortis la 21-an de oktobro 1944 en Danderyd, estis sveda pentristo, teozofa kaj pioniro en abstrakta pentrado. Ŝi estis parto de religiema grupo nomita "la Kvin". Ŝiaj

HILMA AF KLINT



THE TEN LARGEST, NO. 3, YOUTH

sistemaj pentraĵoj povas esti diritaj kiel "vidaj reprezentaĵoj" de kompleksaj filozofiaj ideoj kaj spiritaĵoj". Hilma af Klint estas unu el la artistoj kiuj ricevis atenton kaj rekonon nur longe post sia morto. (Wikipedia)

## Hilma kaj la templokonstruistoj

– pri la pentristo kaj medio Hilma de Klint

de Torben Svendsen

La sveda pentristo Hilma de Klint (1862–1944) estas bombo en la arthistorio.

Ŝiaj pentraĵoj, kiuj ne rajtis aperi antaŭ ol 20 jaroj post ŝia morto, rezultas enkonduki abstraktan arton longe antaŭ la grandaj modernismaj ikonoj. Sed ili multe malsamas al tiuj. Ili estas plenaj de okultaj mesaĝoj. Hilma de Klint laboris kiel komunikilo por spiritaĵoj, kreante siajn monumentajn pentraĵojn laŭ diktado de la spirita mondo.

Kvankam ŝi mortis en 1944, nur en la 1980-aj jaroj, la mondo estis preta por ŝia surpriziga arto, kaj nun ili starigas rekordojn de publiko en la tuta mondo. Ŝi rezignis pri ĉio alia en la vivo por esti en la spirita servo, klarigante la

kuntekston de la tuta universo per koloroj kaj formoj.

Hilma af Klint havis unu grandan vizion, kiu ankoraŭ ne realiĝis:

Mirinda templo, ĉirkaŭita de la Ĝardeno de Misteroj, kiu devas gastigi ĉiujn ŝiajn bildojn kaj esti sankta loko por spirita kontemplado. Laŭ la postlasitaj skribaĵoj de Hilma, la templo devas situi sur la insulo Hven en la Sundo – la maro inter Danio kaj Svedio, kaj la dezajno estas singarde priskribita fare de spiritaĵoj.

En tiu podkasta elsendo, Katarina Lewkovitch vojaĝas en la viziojn kaj religian universon de

Hilma af Klint, kaj en la vizion de ŝia spiralforma Templo sur la insulo Hven.

Ĉu estas tempo, ke la verkoj de Hilma nun trovu sian vojon al la loko, al kiu ili estis destinitaj?

Audiens – Hilma og tempelbyggerne – om maleren og mediet Hilma af Klint. – DR LYD

Partoprenantoj: Artkritikisto, Henrik Wivel, Spirita instruisto, Anne-Sophie Jørgensen, arkitekto, Åsa Landahl, direktoro de la Moderna Museet en Malmö, Iris Müller-Westermann. (La ligilo troviĝas sub la bildo.)

Pretigita de, Katarina Lewkovitch.



<https://www.dr.dk/lyd/p1/audiens/audiens-hilma-og-tempelbyggerne-om-maleren-og-mediet-hilma-af-klint>

## La koloroj de la ĉielarko estas...

**Ruĝa, oranĝa, flava, verda, blua, indigo-kolora kaj viol-kolora.**

La Ĉielarko ja havas sep kolorojn. Sep estas la cifero de la perfekteco.

Ĉe la pli pala sekundara arko, kiu troviĝas ekster la ĉefa arko, la koloroj kuŝas inverse.



*Ĉielarko en Gdansko. Fotoj de Elwira Twardowska.*

La ruĝa koloro donas fortajn reagojn.

La ruĝa koloro en merkato povas igi al pli rapidaj kaj pli neplanitaj aĉetoj. Ne estas

hazardo ke ruĝa estas la koloro, kiun ni ligas al la sveda vorto *rea* (elvendo).

En la evoluo ni profitis de la ruĝa koloro, ĉar ĝi troviĝas en sango kaj fajro. Ĝi helpis al ni



transvivi. Kiam ni vidas la ruĝan koloron, la koro batas pli forte. "Haltu!" en trafiksignoj estas ruĝa. La esting-kamionoj de la fajrobrigado estas ruĝaj.

**Sed – kio pri la amo?**

### **La blua koloro signalas sekurecon kaj trankvilon.**


Blua ĉielo kaj blua maro signalas puran aeron kaj freŝan akvon – ion kion ni bezonas por transvivi. Se kontraŭe la akvo estas verda, ni devas atenti. Povas esti "alga florado". Kiam la ĉielo estas griza, povas esti venena nebulsupo. Ruĝa koloro altigas la pulson, blua koloro malaltigas ĝin. Laŭdire 12 % de la viroj estas kolorblindaj aŭ koloreraj, sed ankaŭ tiuj klare vidas la helbluan koloron. Bone ke vi sciu tion, se vi volas direkti vian reklamon al viroj! La interretaj ligiloj ja ankaŭ estas blujaj.

***Ĉu blua stratlampo povus malaltigi perforton kaj krimon ĉirkaŭe? Imagu ke la nutraĵvendejo Coop havus bluan koloron kaj la aŭtofabriko Volvo verdan? Manĝon oni ne enmerkatis per blua koloro (escepte de mirteloj).***

### **La flava koloro donas al ni energion, optimismon kaj ludemon.**

Gaja kaj vigla persono brilas kiel la flava suno. La flava koloro kunportas lumon. Ĝi estas kontrasto al la blua trankvilo kaj povas igi nin kreaĵoj kaj enfokusitaj. Tamen, en tro granda kvanto, ĝi povas aspekti infaneca, neserioza kaj tro intensa kaj povas doni al ni negativan energion. Aparte introvertaj personoj povas fariĝi ellacigitaj, se tro flavas. Alia malavantaĝo estas ke pli obtuzaj koloroj de la flava povas memori nin pri malsanoj.

Per siaj ludemaj ecoj la flava aparte plaĉas al infanoj. Por montri rapidecon, la flava estas taŭga. La reklamo por la aŭto Ferrari montras



baŭmantan ĉevalon sur flava fono. Mia instruisto pri akvarelpentraĵo diras, ke la flava proksime al objekto en alia koloro helpas ĝin esti bone videbla.

Kiun koloron vi ofte trovas sur ludiloj? Se vi havas firmaon, kiu fieras pri sia rapideco, kiun koloron sur via reklamo vi devas elekti?

### **La oranĝa estas varma, ekzotika kaj optimisma.**

La oranĝa koloro kombinas la ruĝan intensecon kun la flava ĝojo. Estas varma, arda koloro, kiu altiras la rigardojn, sed same kiel pri la flava, ĝi povas esti tro intensa en grandaj kvantoj. Ĉar multaj oranĝaj koloroj troviĝas en nutraĵoj, ekz. en karotoj, oranĝoj kaj kukurboj, la koloro povas igi nin malsataj, kaj tial ĝi bonas ĉe manĝejoj.

***Kio pri la oranĝa koloro en la trafiko?***

### **La verda koloro reprezentas vivon kaj harmonion.**

En la naturo ni estas ĉirkaŭataj de la verda koloro. Ni scias ke verdaj kreskaĵoj donas al ni oksigenon. Ni sentas nin trankvilaj, sanaj kaj harmoniaj, kiam ni estas en verda medio. Ni nomas ekologiajn varojn verdaj, eĉ se ili havas alian koloron. Malhela verda koloro povas direkti la pensojn al mono, ekz. al la dolara monbileto.

***Kial oni elektis la verdan koloron por la esperanta flago?***



## Violkolora, se la reĝino elektus.

En malnovaj tempoj, reĝaj personoj ofte portis violkolorajn vestaĵojn. La violkolora farbo estas malfacile produktita, kaj ĝi rapide paliĝas. Aparte ĉe la kosmetika branĉo, oni havas violkoloran reklamon. Krome laŭdire la violkolora signalas inteligentecon kaj sciadon.

**La logotipoj de la sveda Instruista Ligo kaj la Eduka Administracio estas violaj Kial?**

La blankan kaj la nigran oni ne kunmetas inter la koloroj. Tamen ili ja ankaŭ influas nin.

## La blankan alportas pacon.

La blanko reprezentas ĉion, kio estas pura, honesta kaj senkulpa. Ĝi ankaŭ estas la koloro de la paco. Ni ja ĉias, ke blanka kolombo kaj blanka flago direktas al batalhalto. Dank al tio, la blanko povas inspiri nin al ŝanĝo. Ni parolas pri neskribita blanka paĝo, kiam ni volas diri "Novan starton"!

En hospitaloj la blanko estas domina. Ĝi povas signali sterilecon kaj neŭtralecon kaj oni povas sperti enuon, se ne estas aliaj koloroj samtempe. Kiel fono de tekstoj, ĝi estas la plej bona.


**Svedaj edziniĝintaj virinoj en malnovaj tempoj portis nigrajn robojn, sed nun blankajn. Kial?**

## La nigra simbolas malĝojon kaj animdoloron.

sed ankaŭ elegantecon, potencon kaj aŭtoritaton. La nigra dominas ĉe enteriĝoj. Ĝi ankaŭ signalas malbonaĵon: esti la nigra ŝafo, nigra humuro, esti sur la nigra listo, nigra merkato. Tamen oni ankaŭ kombinas la nigran kun potenco kaj formalajaĵo. Aparte pri vestaĵoj la nigra signalas elegantecon kaj elitecon.

**Ĉu vi konas nigran flagon. Kial ĝi estas nigra? Ĉu fantomo estas blanka aŭ nigra? /Siv**

LA PLEJ PREFERATAJ KOLOROJ DE LA PLEJPARTO DE HOMOJ.



# Lumbago-specialisto sanigas nur per siaj manoj

Renate Klag, Vieno

Mi vidis sur germana televidkanalo ZDFneo elsendon, en kiu Bernhard, 32-jaraĝa lumbago-specialisto (germane: Hexenschuss-Spezialist) parolis pri sia profesio.

Li specialiĝis je kuracmetodo de lumbago kaj kuracas nur per siaj manoj!

Li praktikas antaŭ ĉio en Munkeno kaj ĉirkaŭaĵo. Li havas kvalifikaĵojn multspecajn.

Kiel li diras, li akiris dum dek jaroj multspecajn kvalifikaĵojn: En kuracpraktikado, kiel savsanitaristo, por fizioterapio kaj akupremo (akupresuro). Li pagis ĉion per propra mono. Entute li elspezis 150 000 Eŭrojn por tio.

Li diras, ke inter kvindek mil kaj sesdek mil homoj en Germanio MONATE suferas de lumbago. Li konstatis, ke tre ofte homoj ekhavas tiun lumbagon semajnfine, ĝuste tiam, kiam ili ne sukcesas trovi rapidan helpon. Ankaŭ li mem havis tiun problemon, kiam li estis 28-jaraĝa.



Pro tiuj spertoj li ekhavis la ideon, fondi propran specialan entreprenon por trakti lumbagon kaj decidis labori antaŭ ĉio semajnfine (lia entreprena ideo).

Fakto estas – kiel li diras – ke li nur bezonas siajn manojn por trakti kaj kuraci lumbagon, SEN OPERACIO!

**Verkita de Renate Klag, Vieno**

Ligilo:

<https://www.zdf.de/show/waschen-schneiden-leben/waschen-schneiden-leben-vom-1-dezember-2021-100.html>

## Granda kamiono – regata de nur unu persono



### **Unu sola persono regas 37-tunan kamionon.**

Ingrid kaj mi – du loĝantoj en Gråbo –  
promenis en la vendreda suno.

Ĉe la hejtcentralo ni vidis kamionon – en tri  
partoj.

La kondukisto lerte ligis la unuan parton al la  
dua. Kia precizeco! Antaŭen kaj malantaŭen  
kaj baldaŭ ankaŭ la tria parto estis fiksita.

### **En enda person manövrerar en 37-tons lastbil.**

*Ingrid och jag – två Gråbobor – promenerade  
i fredagsolen.*

*Vid värmeverket såg vi en lastbil – i tre delar.*

*Föraren fäste skickligt den första delen och  
vid den andra. Vilken precision! Framåt och  
backning och snart var också den tredje delen  
fast.*



**La kamiono, kiu transportas boletojn  
de brulaĵo al la hejtcentralo de Gråbo  
tenas sian protektan flugilon super la  
kondukisto.**

*Lastbilen, som transporterar pellets till  
värmecentralen i Gråbo håller sin  
skyddande vinge över föraren.*

**Kompreneble li ne havas tempon por  
longa intervjuo surloke.**

## *Sommardagar i Göteborg 2022 – pröva en kurs i Esperanto*

– ett logiskt och spännande språk med globala ambitioner.

**Plats:** Vuxenskolan, Karl Gustavsgatan 15,  
Göteborg.

Grupper på tre olika nivåer.

**Tid:** må 20 juni – to 23 juni kl. 10–15.

Sista dagen gör vi en halvdagsutflykt och  
prövar att tala esperanto.

**Avgift:** 100:–/dag = 400:– Pg 436 12-1

**Arrangörer:** Göteborgs Esperantoförening,  
Esperanto-lärarnas förbund (ILEI) och  
Studieförbundet Vuxenskolan.

**Håll koll** på Göteborgs Esperantoförenings  
hemsida [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org) för ev. ändringar.

**E-post:** [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se)

**Mer info:** Siv Burell: [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) (070-721 34 79)





## ”Stulta kiel Azeno”

”Stulta kiel azeno!” Ĉu vi iam diris tion? Hodiaŭ mi pardonpetas al ĉiuj azenoj, se mi iam diris tion. Antaŭ kelkaj semajnoj, sur trafikata ŝoseo ĉe la periferio de Najrobo, mi vidis solecan azenon vagadi laŭ la vojrandoj. Kompreneble, la azeno marŝis sur la dekstra flanko de la vojo ĉar estas maldekstra trafiko. Ni kvardekjaruloj ankaŭ lernis marŝi sur la dekstra flanko jam en la bazlernejo ĉar tiam estis ankaŭ maldekstre trafiko en Svedio.

Subite aperas interspaco en la trafiko sur la plej proksima vojo, la azeno turniĝas akre 90

gradojn, iras antaŭen tiel ke ĝi estas nuba super la centra linio kaj turnas la kapon maldekstren por atendi ankaŭ interspaco en tiu vojo, dum la trafiko denove ruliĝas malantaŭ ĝia vosto. Interspaco aperas en la alia vico kaj la azeno faras kelkajn rapidajn paŝojn al la alia flanko de la vojo. Mi promesas kaj ĵuras: mi ĉiam konsideros la azenon bonanima, saĝa, laborema kaj amika besto estonte!

**Kjell Erik Arvidsson de Kenio**

13 Februari 2018


## Kial ne investi en la homscienco?

Prenita de ”La retaĵo pri Lingva Defendo” – Nätverket Språkförsvaret – Merkredo 16 feb

[...] Kutime kiam mi legas pri lernejoj establaĵoj en svedaj municipoj, ofte estas lernejo kun sporta profilo aŭ la Internacia Angla Lernejo (IES) al kiuj oni rilatas. Ĉu ni vere ricevu nur unu specon de oligopolo ĉe sportaj lernejoj aŭ anglaj lernejoj estonte? Ĉu ne estas tempo plivastigi la lernejan ofertan?

Kial ne reestabli nov-malnovan lernejan varianton anstataŭe? Mi tiam rekomendas lernejon kun homara fokuso (homscienco). En ĉi tiu lernejo, studentoj povus studi la modernajn EU-lingvojn franca, germana kaj/aŭ itala/hispana. Kompreneble, ankaŭ la angla estas en la horaro. Krome, la sveda kun literaturhistorio kaj kun elementoj de





ĝenerala lingvoscio kaj historio/kulturhistorio. En tiu kazo, ĉi tio devus esti la ĉefa fokuso. Sed ankaŭ aliaj tradiciaj lernejoj fako estu inkluditaj, kiel matematiko, biologio, fiziko, kemio kaj civitana edukado.

Certe ni estonte povos ne nur trejni sportistojn kaj "anglalingvanojn" en svedaj

lernejoj? Ĝi fariĝas tro limigita!

PS. La unua instrulingvo en la lernejoj devas kompreneble ĉiam esti nia gepatra lingvo, la sveda. Ni vivas kaj laboras en Svedio, EU-lando.

C-G Pernbring

## Pri "la monda lingvo" diskuto inter Johan Lönnroth kaj Bo Sandelin

Roger Nilsson sendis la jenan:



**Johan Lönnroth**, naskita 1937 en paroĥo Vasa en Gotenburgo estas sveda politikisto (maldekstra partimembro) kaj ekonomikisto. Lönnroth estis membro de la sveda parlamento 1991–2003 kaj vicprezidanto de la Maldekstra Partio 1993–2003.

**Bo Sandelin** (nask. 1942) estas profesoro emerita je Ekonomio kaj Juro ĉe la Lernejo de Komerco kaj la Universitato de Gotenburgo. Liaj interesofakoj en ekonomiko estis kapitalo

kaj investteorio (licenca disertacio), loĝekonomiko (doktora disertacio), krimea ekonomiko, kaj en la lastaj jardekoj ĉefe la historio de ekonomia pensado.

**Jen traduko de interŝanĝo de leteroj en Fejsbuko inter Johan Lönnroth kaj nia Esperanto-samideano Bo Sandelin:**

Mi (Johan) ricevis ĉi tiun leteron de mia amiko kaj kolego pri ekonomiko Bo Sandelin:

Saluton Johan,

Mi nun legis vian romanon pri "Jonna kaj la senlima demokratio" ("Jonna och den gränslösa demokratin"). Ĝi estis kontentiga kaj riĉiga. En estonta tria parto, vi verŝajne eniros pli detale pri kiel la monda parlamento estas organizita. Mi scivolas pri la laborlingvo de la Parlamento. Oni povas imagi grandegan interpretan kaj tradukan organizon, kiu kreas ion kiel justecon en komunikado. Aŭ oni povas tute cedi al anglosaksa lingvo kaj kultura imperiismo, malgraŭ la grandegaj profitoj, kiujn ĝi donas al nordamerikanoj, angloj kaj iuj aliaj en komunikado. Aŭ vi povas imagi, ke relative facile lernebla, konstruita kaj ekde la fino de la 19-a jarcento ekzistanta lingvo povas fariĝi laborlingvo kaj havigi proksimume egalajn kondiĉojn por ĉiuj... "ĉies

alia lingvo". Mi ne disvolvos ĉi-lastan ĉi tie ĉar vi scias, kion mi volas diri.

Sentu bone! /Bo

Mi (Johan) respondis:

Kiel feliĉa mi estas pro ĉi tiu via reago. Kompreneble, la lingvo de la monda parlamento devas esti Esperanto!

Ĉu vi permesas al mi afiŝi ĉi tiun korespondadon en Fejsbuko?

Li permesis ĝin. Kion ni aludas, estas la libro de Bo "Esperanto – la revo de mondlingvo". La lasta elemento en la programo de la Socialdemokrata Maldekstra Partio el 1917 estis, cetere, "Mondlingvo".

Saluton

Johan

## Kapti fremdajn lingvojn

Kiam mi antaŭ longe laboris pri malaŭdantaj enmigrintoj en la labormarkato, mi ofte aŭdis, ke labordonantoj diris: "Vi estas bonvena reveni kiam vi lernis la svedan." Mi miris. La enmigrinto ja jam bone lernis la svedan, laŭ mi. Tamen mankis iomete de la vortordo de la frazkonstruo kaj la tipa sveda frazmelodio. La enmigrinto ja havas eblecon "soni kiel svedo" se ri povas trejni en laborsituacioj. La instruistoj pri la sveda por nesvedoj ja estas tro pedantaj koncerne ĉiutaga babilado.

Mi ankaŭ rimarkis ke mi pli bone kaptis la anglan, se parolante de svedo, ol de anglo, eble pro la erara kaj konata frazmelodio de la svedo. Nia iama ŝtatministro

Carl Bildt, estas bona ekzemplo pri "fluanta angla, parolante kun sveda akcento".

/Siv



*Ĉu vi bezonas etan, facilan teatraĵon?... Jen la malnova historio pri la ruza musino:*

**Musido:** Patrino, rakontu ion!

**Musino:** Volonte. Mi memoras iun tagon kiam ni promenis kune. Subite ni ekvidis katon.

**Musido:** Ah! Ĉu la kato vidis nin?

**Musino:** Ne, feliĉe ĝi ne vidis nin.

**Musido:** Kion vi faris?

Musino: Mi pensis ke estu bone timigi la katon.

Musido: Musoj ne povas timigi katojn, sed katoj ofte timigas musojn.


Musino: Temas pri lingvoj. Mi tre forte kriis: - "Vuv, vuv" - kaj la kato rapide forkuris.

Musido: Ho, bone, bonege! La kato pensis ke vi estas hundo.

Musino: Jes. Nun vi komprenas, ke estas tre bone lerni lingvojn!

## Lingvaj parencoj sur parencobranĉoj

De FB-paĝo de Donald Kasper



Kreite de Minna Sundberg.

Tiu ĉi lingva arbo enhavas multajn gepatrajn lingvojn. Kelkaj el ili povas esti konsiderataj endanĝerigitaj aŭ en risko, hodiaŭ, ekzemple kataluna aŭ kimra. Sed kun tutmondiĝo aperas iuj interesaj lingvaj tendencoj.

### 1. Lingva reviviĝo

Iuj enklavoj de marĝenitaj lingvoj estas konservitaj de fiero pri la tradiciaj kaj kulturaj historioj alkroĉitaj.

Dum la kataluna iam estis malpermesita, ĝia renaskiĝo estas grava signo de identeco en Barcelono. Pli ol 150 universitatoj instruas la katalunan tutmonde.



Kiam temas pri la kimra lingvo, mamuta universitata projekto planas certigi, ke ĝi ne formortos. Esploristoj kompilas dek milionojn da kimraj vortoj por konservi la pasintecon, estantecon kaj estontecon de la lingvo.

## 2. Lingva prognozo

Nuntempe, la angla estas la lingua franca – adoptita kiel komuna lingvo inter parolantoj de malsamaj gepatraj lingvoj. Tamen, ĉi tiu statuso eble baldaŭ pli malklariĝos dum demografiaj tendencoj daŭras. La pliiĝo de Ĉinio estas evidente konsiderendaj. Dum Ĉinio daŭre pligrandigas sian ekonomian forton kaj influon, ankaŭ ĝia lingvo disvastiĝos.

En la sama tempo, **26 afrikaj landoj** estas taksitaj duobligi sian nunan lingvo-grandecon. Multaj el ili parolas la francan kiel sia gepatra lingvo. Studo de la investa banko Natixis sugestas, ke la kresko de Afriko povus tre bone altigi la francan – igante ĝin la plej parolata lingvo antaŭ 2050.

**/Mia komento: Sciencistoj ne enkalkulas Esperanton inter la vivantaj lingvoj. Kiel ni atentigu ilin? Cecilia Malmström (eksa ministro pri komerco en EU), iam vizitis la gotenborgan klubon. Ŝi diris: "Vi devas esti pli videblaj!"**

/Siv

# Bonaj legomoj kaj klimat-ruzlertaj receptoj!

Ĉi tiu numero prezentas du kuiristojn, kiuj havas specialan intereson por la verdo en la menuo. Ili estas Paul Svensson kaj Zeina Mourtadi kaj ĉi tiuj du publikigis kuirlibron kune nomitan "Middagskompassen", kiu disponigas tagmanĝproponojn kiuj estas bonaj kaj por la manĝantoj kaj por la tuta planedo. 80 klimat-inteligentaj receptoj!


Donaco-propono eble?



## Zeina Mourtada

Zeina havas manĝblogon nomitan "Zeinas Kitchen" interrete, kie ŝi dividas sian grandan pasion por vere bona manĝaĵo. Krome, ŝi estas la nura kuiristo kiu havas sian hararon modele kovrita dum kuirado. Ŝi ricevis poentojn pro tio!

Zeina naskiĝis en 1982 en Siera-Leono, sed kreskis en Malmö kun radikoj en Libano. Ŝi ankaŭ laboris kiel instruisto ĉe la "Fryshuset" en Husby, Stokholmo, kie ŝi okazigis kuirklasojn por junuloj. Hodiaŭ ŝi estas unu el niaj grandaj personuloj pri manĝo. La nomo





“Zeina” signifas kaj bela kaj gastama, do simple ĵetu vin al la recepto! Mi promesas, ke estos festo, kiun vi ne baldaŭ forgesos.

### **Kukurbo-ruloj kun fromaĝo kaj spinaco**

2 mezgrandaj kaj firmaj kukurboj (ĉirkaŭ 700 gramoj)

1 mocarelo-fromaĝo por ornamo, ĉirkaŭ 125 gramoj (alternative alia speco de fromaĝo)

Freŝa bazilio kaj olivoleo por ornamo

### **Vegetara farĉo**

3 dl acida kremo (aŭ rikoto)

1 decilitro raspita parmesana fromaĝo

65 gramoj da beba spinaco

1 poto sunsekigita tomato (200 gramoj)

2 ajleroj

Salo kaj nigra pipro

### **Tomata saŭco**

1 poto ĉerizaj tomatoj (400 gramoj)

1 poto dispremitaj tomatoj (400 gramoj)

1 ruĝa aŭ flava cepo

2 ajleroj

2 kuleretoj sekigita origano

Salo kaj nigra pipro

Oleo por friti

### **Faru ĉi tion**

Komencu per la tomata saŭco.

Haku la cepon en malgrandajn kubojn. Fritu la cepokubojn ĝis ili fariĝas bruna. Enmetu origanon kaj ajlon kaj fritu iom pli. Enmetu la tomatojn, salon kaj pipron kaj lasu la tomatan saŭcon kuiri sub kovrilo sur meza varmo dum ĉirkaŭ 30 minutoj. Dume, preparu la kukurbojn kaj la farĉon.

Faru la farĉon. Diserigi la spinacon, haki la sunsekigitajn tomatojn en malgrandajn kubojn. Miksu kun acida kremo, la raspitan parmesanon, la raspitan ajlon, la sunsekigitajn tomatojn, salon kaj pipron.

Tranĉu la kukurbojn en maldikajn, tamen ne tro, tranĉaĵojn. Uzu fromaĝodetranĉilon.

Antaŭvarmigu la fornon al 225 gradoj, varmo kaj super kaj sube.

Metu peceton da farĉo, ĉirkaŭ 2 kuleretoj, sur la kukurba tranĉaĵo kaj rulu.

Metu tomatan saŭcon en la fundon de forna plado, metu la kukurbajn rulojn kun la junto malsupren en la formo sur la tomata saŭco. Raspu la mocarelon kaj kovru la kukurbokubojn per fromaĝo. Verŝu iom da olivoleo kaj kuiru meze de la forno dum ĉirkaŭ 25 minutoj. Garnu per freŝa bazilio kaj servu.



### **Paul Svensson**

Paul Svensson volas disvastigi sian intereson pri manĝaĵo, sian intereson pri kuirado kaj manĝoj kaj igi pli da homoj ĝui kiel li. Nenio devas esti pli komplika ol necesas, ĝi ne devas esti multekosta kaj komplika por esti vere bona kaj sana. Li opinias, ke kuirado povas preni iom da tempo foje. Kaj fariĝi bela eĉ en labortago.

La deirpunkto estas ĉiam fruktoj kaj legomoj. La receptoj baziĝas sur io vegetara sed povas esti kompletigitaj per viando, kokaĵo aŭ fiŝo por tiuj kiuj deziras.

Bonvolu rigardi en la kuirejon de Paul Svensson. Li ne ĉiam riproĉas "Bambatanter\*" aŭ kuiras tagmanĝojn el grasaj larvoj. Multaj el liaj receptoj estas kontraŭe tre bongustaj. Malsupre estas recepto por greka kebabo.

*\* Bambatant estas ino kiu laboras en lerneja kuirejo.*

### **Greka kebabo**

Kebabo en la greka! Vego-farĉaĵo estas formita al longformaj viandbuletoj kaj simple kuirita sur bakpleto en la forno por esti fritita je servado. Kun tio, "catcikoj", terpomoj kaj salato estas servataj.

Estos multaj vego-buletoj de la pasto. Tiuj kiuj ne estas manĝitaj povas esti frostigitaj por alia okazo. Kradrostu volonte, ekstere aŭ endome, ne gravas.

### **Greka kebabo**

1 pako vegomiksaĵo, formebla, alternative muelita viando.

1 flava cepo

5 ĉampinjonoj

2 ajleroj

2 ovoj

1,5 kuleretoj de muelita kumino

1,5 kuleroj de freŝa rosmareno, hakita

1 citrono, fajne raspita ŝelo (konservu sukon por salato)

olivoleo por friti

salo

nigra pipro, freŝe muelita

### **Por servi:**

Terpomoj en pecetoj, tomata salato kun ruĝa cepo kaj vinagro.

Havu vere bonan manĝon, kian ajn miksaĵon vi elektas!

## **Filmprojekto en DR Kongo kun Esperanto parolata**

de Joel Muhire

### **La filmo « Kvazaŭ korpo sen koro »**



Dise tra la mondo estas amatoroj de filmoj – la filmoj mem estas diverslingvaj tamen oni sentas sin allogita de lerta aktorado, bela pejzaĝo ktp. kvankam la enhavo de la filmo povas esti nekomprenata ĉar la lingvo de ĝi sonas tute nekonate en la oreloj, eble!!! La filmoj ĝenerale instruas, distras kaj konigas la lingvon en kiu ĝi estis farita.

**Bedaŭrinde tro raraj veraj filmoj en nia internacia lingvo!** Por kovri tiun mankon, kelkaj afrikaj aktivuloj komencis fari filmojn en Esperanto, mi citas ekzemple: la heredaĵon, de Dankon Kwibe el Kongo-Burundo.

En Oktobro 2019 aperis en la rubriko Afriko brilas de la revuo Esperanto de UEA artikolo: Afriko kaj filmoj en Esperanto. Ĝuste per tiu projekto ni celas riĉigi la Esperanto-kulturon, pruvi ĝian parolatecon al neesperantistoj kaj pere de ajntemaj filmoj kaj altiri la scivolemon de ĉi-lastaj pri Esperanto. La alvoko pri financado eblas aŭskulti per tiu ligilo:

[https://www.youtube.com/watch?v=7N3\\_syrZOPQ](https://www.youtube.com/watch?v=7N3_syrZOPQ) kaj legi pri la projekto en:

<http://kunfarejo.frali.bplaced.net/?p=1913>

Jen estas frukto de 2-jara kunlaboro inter la Esperanto-Klubo « Rondo Esperantista de Kiwanja, (REK) » kaj Kina Klubo "La Patience" de Rutshuru, Norda Kivuo, en DR Kongo, kuninstige de Joel Muhire kaj Kambale Amani Love. La filmo aperis la 7-an de novembro 2021, kaj ĝi spekteblas en du partoj ĉe:

<https://youtu.be/fOgcD8eFXIE> kaj

<https://youtu.be/qv0WUYENO2s>

La filmo prezentas ampleksan bildon pri konstanta malfacila vivo en la orienta parto de DR Kongo, ekster la pli kruelaj pertranĉilaj murdaj scenoj en Beni far ADF NALU.

Espero, la ĉef-rolulino, havis normalan vivon kaj ardan revon iĝi la plej bona kaj lerta atletino de sia generacio. Sed iam pro


konfliktoj naskiĝintaj en ŝia loĝoloko rezulte de politikaj voĉdonadoj, ŝi kaj aliaj samaĝulinoj bedaŭrinde perforte forkaptiĝis. Dum ilia forkaptado, ili devis kontraŭvole servi en ribela grupo kun la nomo Movado de Sentima Generacio, kie ili ĉiuj plurfoje estis seksperfortitaj kaj truddegitaj murdi. Finfine danke al la klopodoj de la familio kaj kunlaboro inter pluraj personoj kaj publikaj instancoj, Espero kaj ŝiaj amikinoj liberiĝis...

La filmo temas pri aferoj kiuj vere okazas surloke en DR Kongo kaj en multegaj aliaj landoj sur la kontinento.

Ekde la komenco de "Kvazaŭ korpo sen koro" helpis per vasta informado kaj diskonigado Renato Corsetti, Germain Pirlot kaj Jean-Pierre Marcq de Esperanto-plus. Same gravas menciigi la kontribuon ankaŭ de s-anoj Ulrich Matthias kaj Kiah Morante, Miriadano, kies monsubtenoj, korektoj kaj konsiloj necesis por atingi tiun rezulton. (El la recenzo de Adjévi Adjé pri nia filmo).

Rondo Esperantista de Kiwanja, kunlabore kun aliaj kluboj lokaj, ne nur La patience esperas produkti pli da instruaj filmoj en la venontaj jaroj.

**Via amiko Joel Muhire**



Konto ĉe UEA:  
jmhr-a

Kontaktadreso: [joelmuhire0@gmail.com](mailto:joelmuhire0@gmail.com)

WhatsApp: +243977643030.

[www.senopone.wordpress.com](http://www.senopone.wordpress.com)

# Kiel nomi ĉi tiun objekton?

Dum la lunda Zoom-kurso mi petis helpon de la partoprenantoj por trovi la ĝustan vorton por ĉi tiu objekto. Kelkaj junuloj ja troviĝas tie.

Sur la maro oni povas uzi **surfotabulon** (svede: surfbräda) – sed tiu vorto ja ne taŭgas por mia "i-pad". Ŝerce oni diras (svede): padda, (esperante: bufo), sed besto ja ne estas enmiksita en la teknikaĵo. **Surfplato?** – sed certe Esperanto ne havas la saman vorton por la mara sporto kaj la komputilado.



**Tabulkomputilo** estis unu propono. En "Bildvortaro" (paĝo 733) troviĝas ĉi tiu vorto, sed la bildo montras malmodernan "legoplato", sed eble la vorto ne estas malmoderna eĉ se la objekto aspektas tia.

**Tablojdokomputilo** estis alia propono, aŭ **tablojdo**.

Laŭ mi "tabulo" kaj "tablojdo" estas tro grandaj. Tablojdo estas ja granda gazeto, sed la aludo al gazeto estas ja sufiĉe bona – iu legohelpilo!?... Alia propono estis **tableta komputilo**, aludante la malgrandajn tukojn, kiuj povas kuŝi sub la teleroj. Almenaŭ la grandeco similas al la objekto. En la sveda vortaro de Nylén (1954) **tablojdo** estas tradukita: "**medikamenta pilolo**". Do, ege malgranda komputilo! 😊

**Tablojdo** estas la vorto, kiun Guglo proponas. Ĉu Guglo estas fidinda?

**Do... kio estas la plej bona vorto?**

/Siv

**Aldono de Birgitta: Tablojdo – farmacia plata pastelo (laŭ PIV), tableto = litet bord, tabulo = bräde/a, tavla, surfotabulo =**

**surfbräda (på snö eller vatten), tabulkomputilo = surfplatta (enl. Bildvortaro av Petro Desmet).**

**Kaj jen: komento de Sten Johansson**

Saluton, Siv.

Jen sube mia komento.

Amike, /Sten

Mi mem ne posedas tian aparaton, sed mi pensas ke la plej uzata vorto por ĝi estas 'tabulkomputilo'. Oni trovas tiun interalie en Monato kaj Kontakto.

Bonvolu noti ke Esperanta 'tablojdo' havas absolute nenian rilaton al sveda 'tabloid'. Tio estas falsaj amikoj, similaj al semester – semestro. Tablojdo estas "Farmacia plata pastelo", laŭ PIV kaj "tablett (med.)" laŭ Vilborg.

En Vikipedio ĝi nomiĝas 'tabulkomputilo' aŭ 'platkomputilo'.

Similan platon por legi bit-librojn (elektronikajn librojn) Vikipedio nomas 'Elektronika librolegilo', sed mi pensas ke pli



ofta aŭ almenaŭ pli bona vorto estas 'bit-legilo'.

Kiam temas pri modernaj objektoj, kie la vortaroj ne helpas, mi rekomendas unue serĉi la svedan vorton en Vikipedio, kaj poste rigardi, ĉu ekzistas Esperanta Viki-paĝo. Ankaŭ la Vikipediaj paĝoj en aliaj lingvoj

kelkfoje povas doni helpon, kiel nomi iun aferon.

Kompreneble oni ne povas blinde fidi Vikipedion, do trovinte vorton tie, oni plu esploru, ĉu la vorto estas praktike uzata, ekzemple per guglado. Cetere la samo validas, se oni trovas ion en vortaro.

/Sten Johansson 😊


## Komputila humuro

- Kiu elŝutis la unua ion el la nuboj?
- Moseo.

Interparolo ĉe la helpservo:

- Ĉu la komputilo estas malantaŭ fajromuro?
- Ne, ĝi estas ĉe fenestro.

La komputilo mesaĝas:  
Premu laŭvolan klavon por fini,  
aŭ alian klavon por daŭrigi.



Komputiloj ja faras taskojn tre rapide –  
ekzemple faras vin rapide treege kolera.

## Studsezono PRINTEMPO en Greziljono, Francio



Jannick Huet

Karaj lernantoj

La intensiva studperiodo "Printempas", post paŭzo de du jaroj, okazos en 2022 espereble kun vi!

Aliĝu ĉe <https://gresillon.org/aligho>

Niaj talentaj kaj junaj instruistoj preparos vin al KER-ekzamenoj. Legu en <https://gresillon.org/printempo> /Jannick HUET

Maison culturelle  
Esperanto Kulturdomo  
Gresillon

Maison Culturelle de l'Espéranto  
château de Grésillon  
F-49150 Baugé en Anjou

**KURSARO/ stage  
PRINTEMAS**  
22 - 30 avril 2022

Marion Quenut  
kurso/cours  
A1 A2

Christophe Chazarein  
kurso/cours  
B1

Sabi Szabolcs  
kurso/cours  
B2

Psemek Wierzbowski  
kurso/cours  
C1

Vidu/voir [gresillon.org/p](https://gresillon.org/p)

# Adri Pásztor, Hungario, rekomendas libron

pasztorlaszlo.adri


Karaj,

Ni eldonis la libron konsistantan el portretoj de 16 esperantistoj kun iliaj eseoj. La portretojn portretis Helga Plotner el Germanio. Ni jam eldonis 3 librojn en tiu serio, do en tiuj 4 libroj aperis 64 esperantistoj. Helga nun portretas por la 5<sup>a</sup> libro.

Mi ekspedis 20 ekzemplerojn al UEA, do post 2 semajnoj vi povos mendi ĉe Libroservo de UEA.

***Esperanto por mi* n-ro 4–16 esperantistoj portretitaj de Helga (oranĝa kovrilo).**

**A4, 16 paĝoj, kolora.**



Jenaj homoj aperas en la 4a libro:

1. AIKAWA, Takuya (Japanio)
2. BECKLIN, Hans Eric (Usono)
3. BOYADZHEVA, Eva-Parashkeva (Bulgario)
4. CHRDLE, Petro (Ĉeĥio)
5. CHUN, Amira (Koreio)
6. IONESOV, Anatolij I. (Uzbekio)
7. Ĵomart kaj Nataŝa (Ĵ&N) (Svedio)
8. KLAWE, Christoph (Germanio)
9. LAROCA, Maria Nazaré (Brazilo)
10. LE DRU, Elisabeth (Francio)
11. LIANG, Ziming (Ĉinio)
12. RAVELOHARISON, Miora (Madagaskaro)
13. SONG, Ping (Ĉinio)
14. TRỊNH, Hồng Hạnh (Vjetnamio)
15. TSHAMENA, Aleksandrine Omba (DR Kongo)
16. Galerio de Helga Plötner



# Invito al librorondo per Zoom

Unu dimanĉon/monate je la 17a horo ĝis la 18a (mezeŭropa tempo).

La 24an de aprilo komenciĝos nova librorondo.



Nia nova libro estos la novelaro "Sur bluaj planedoj" aperinta aŭtune en 2021. Feliĉe ties verkistino **Laure Patas d'Illiers** estis kaj estos partoprenanto de la librorondo. Ni kune decidis kiom da noveloj ni legu por ĉiu kunveno. Krom Laure, kiu estas parizano, ankaŭ kelkaj aliaj personoj el aliaj landoj partoprenis kaj espereble daŭre partoprenos.

Vi bezonos la Zoom-ligilon por kunesti. Bv anonci vin al mi per mia retadreso: [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com). Kaj havigu al vi la libron! Ĝi haveblas per UEA aŭ per Bokus.

*En numero 48 de Ora Ĵurnalo vi trovas ligilon al video kun intervjuo de Laure Patas d'Illiers ([www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)).*

La eldonejo **BOKUS** donas la jenan informon:

**Sur bluaj planedoj** (kun grandaj literoj)  
Sciencfikciaj noveloj de Laure Patas D'Illiers  
Esperanto, 2021-09-07, **277 SEK** (ĉirkaŭ 28 €).

Kompreneble la libro troviĝas ĉe **UEA** kun aŭ sen grandaj literoj:

[libroservo@co.uea.org](mailto:libroservo@co.uea.org)

Katalogo: <https://katalogo.uea.org>

**Bonvenon!**

**Ingegerd Granat kaj Siv Burell,**  
**Esperanto-Societo de Gotenburgo**

## Esperanto-Societo de Gotenburgo troviĝas nun en Fejsbuko



**Göteborgs Esperantoförening**  
**- Esperanto-Societo de**  
**Gotenburgo**

Vizitu nin: <https://www.facebook.com/esperantogbg>